# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (886) • 2011 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Jubilea jaro | 3 |
| Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, V | 6 |
| Lumo fine de la mondo | 10 |
| Kelkaj ideoj de Søren Kierkegaard | 12 |
| Al Mianmaro oni katenas la buŝon | 16 |
| Ŝercoj kolektitaj (5) | 18 |
| La forto de malbona kutimo | 19 |
| Ne sufiĉas | 20 |
| Mi memoras | 21 |
| Informetoj | 22 |
| Mesaĝo por virina tago | 23 |
| Sen ĉen', sen pen' | 24 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Kiel vi legas en la artikolo de nia prezidanto, ni ĉi-jare festas la cent-jariĝon de KELI. Kio okazis dum tiuj jaroj? Mia plej granda deziro estas ke mi daŭre ricevu de vi multajn kontribuojn kiuj respegulas la memorojn pri diversspecaj okazaĵoj. Tiuj memoroj samtempe montras kio okazis en nia movado. Vi jam povis legi kelkajn memorojn kaj ankaŭ ĉi-numere vi trovos kongresmemoron. Mi esperas ke vi, same multe kiel mi, ĝuas legi tiujn memoraĵojn de niaj gefratoj.

Alia ebla temo povas esti iu korespondado aŭ renkontiĝo kun KELI-ano. Se vi havas fotojn mi volonte akceptas ankaŭ ilin. Klare indiku se vi volas la fotojn ree.

Kaj ne forgesu ke nun komenciĝis nova jaroj kaj ni devas pagi la membrokotizon.

# Jubilea jaro

Philippe COUSSON, FR

KELI troviĝas ĉijare en sia jarcenta jubilea jaro. Antaŭ cent jaroj Esperantistoj Kristanoj, dum la Universala Kongreso en Antverpeno decidis la 25-an de aŭgusto 1911 fondi internacian organizaĵon de Kristanaj Esperantistoj. Nuna posteulo de tiu tiam fondita asocio estas KELI.

Kiuj estis la emoj, la revoj? Kio estas nun KELI? Ĉu emoj? Ĉu revoj? Kaj efektivoj?

Ekzistas tre interesa libro, kiun ĉiu KELI-ano devus almenaŭ unufoje legi, ĝi estas *Nia Historio*, de Henk de Hoog, 1964. Ĝi pritraktas la 50 unuajn jarojn de KELI. Ni fakte serĉas tiun, kiu povus verki pri la sekvantaj 50 jaroj. Tiu libro estas mia ĉefa fonto por iomete priskribi la komencajn ecojn de nia Ligo.



Paul Hübner



Philippe Cousson

Fakte, antaŭ la ekzisto de nia Ligo, Kristanaj Esperantistoj jam aktivis. Ilia tiama celo estis akcepto kaj uzo de Esperanto pere de grandaj gravaj kristanaj societoj, kiel KAJV (angle YMCA, France UCJG) aŭ Kristana Celado (Christian Endeavour). Ili ricevis foje esperigajn respondojn, foje ne, kaj ni nun scias ke tio ne efikis. En tiu agado troviĝis inter aliaj la unua redaktoro de Dia Regno (1908) kaj la unua prezidanto de nia Ligo, la germano Paul Hübner.

La agadoj en tiu direkto daŭris, al KAJV, kaj ankaŭ kiam ĝi ekzistiĝis al Ekumena Konsilataro de Eklezioj. Estis ekzemple peticioj. Tamen la efiko restis la sama.

Oni trovas en la unua propono por

statuto:

Celo: a. Propagandi, enkonduki kaj utiligi Esperanton inter Kristanaj societoj… b. disvastigi Kristanan Esperantan literaturon.

Vi rimarkas ke la unua zorgo restas, kaj ke alia venis, la literaturo.

La manko de Kristana literaturo estis elemento en la negativaj respondoj.

Estis do tradukita la Biblio, la Nova Testamento de angla komitato, kaj la Malnova Testamento de Zamenhof mem. La kompleta Biblio aperis en aŭtuno 1926. Nur fine de la 20a jarcento aldoniĝis al tiu "protestanta" Biblio la duakanonaj libroj en traduko de Gerrit Berveling.

En la daŭro de la vivo de KELI kaj ĝiaj sekcioj aperis diversaj himnolibroj ĝis KELI eldonis *Adoru Kantante* en 1971 sub la gvido de Adolf Burkhardt. Kaj aperis en 2001 la libro *Adoru*, kiu krom esti himnolibro estas ankaŭ Diservo- kaj preĝ-libro, kun ekumena karaktero, kies motoroj apud Adolf Burkhardt estis Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberg.

Ni nun posedas la ĉefajn elementojn por komuna Kristana vivo.

Unu grava afero por la unuaj anglaj membroj estis la okazigo de Esperantlingvaj Diservoj, kiujn ili rapide starigis. Kaj nune, daŭre oni celebras Esperantajn Diservojn en diversaj lokoj pli-malpli regule, en kaj ekster la Esperantistaj kunvenoj.

De la komenco ĝis post la Dua Mondmilito la kunvenoj de nia Ligo okazis dum la Universalaj Kongresoj aŭ aliaj Esperantistaj kunvenoj. Grava novaĵo okazis en 1947 en Tostarp, Svedujo. Temis pri la unua KELI-kongreso. Tio fariĝis rito por nia Ligo, kaj nun kunportas la esencon de la vivo de nia Ligo. Ni ĉijare jubileos nian Ligon en KELI- kongreso, nia 61-a, en Poděbrady, Ĉeĥa Respubliko.

En la historio de KELI, de Svedujo kaj Nederlando venis du diversaj agadoj: la helpagado de la Svedoj (Anna Alamo) por la Nederlandanoj post la Milito, kaj la porblindula agado de Jacques Tuinder, unuflanke kaj la


Gerrit Berveling


Anna Alamo-Sandgren


Jacques Tuinder

# NOVA JARO –

# ! NE FORGESU LA MEMBROKOTIZON !

Misia agado, kun la elstara laboro de Karl-Olof Sandgren “Esperanto Misio”, aliflanke. Nun Jerald Veit kaj aliaj uzas la interreton por disvastigi la Evangelion en Esperanto.

Mi ne volas forgesi, ke de la jaro 1968, okazas niaj kongresoj komune kun la katolika ligo IKUE de tempo al tempo, plejofte ĉiun duan jaron. Tiel estis en Wroclaw en 2009, kaj teorie tiel estos en 2012. Ni dum tiu jarcento ne nur lernis esti Kristanoj el diversaj nacioj, el diversaj *protestantaj* eklezioj, sed ankaŭ el diversaj eklezioj, kaj vivi ĉiam kiel gefratoj en Kristo.

El kio ni vivas nun? Por kio? Ĉu ni troviĝas en unu el la krizoj kiujn travivis KELI ?

Ni efektive konstatas ke nia membraro malkreskas, sed daŭre ni kongresas, daŭre aperas nia revuo *Dia Regno*.

Ĉu ni faru plu? Ĉu ni revu pli?

Mi pensas, ke ni devas unue pludaŭri en niaj nunaj agadoj, kongreso kaj revuo, helpagado kaj Diservoj, kaj ĉefe diskonigi ĉi tion. Certe kelkaj havas ideojn, emojn, revojn. Ni estas malfermitaj al viaj elanoj, al novaj sopiroj, laŭ la inspiro de la Spirito.

Mi esperas vidi vin en Poděbrady venontan someron por malfermi novan jarcenton al la Kristana Esperantismo aŭ al la Esperanta Kristanismo, aŭ kiel vi volas diri.



Albrecht Kronenberger



Bernhard Eichkorn



Adolf Burkhardt

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, V

## Du tre malsamaj episkopoj – Andreo Dudith kaj Nikolao Steno

Endre DUDICH, HU

## ANDREAS DUDITH (1533-1589)

Episkopo kiu iĝis herezula sciencisto

*"Mia devo estas gvidi la homojn al la ekkono de la Vero."*

### Studento kaj sekretario

Andreas Dudith naskiĝis en Buda., Hungario. Lia patro, Hieronimo/ Jeromos, estis kroata oficiro; lia patrino, Maddalena di Sbardellato, nobela itala damo. La patro mortis en kontraŭ-turka batalo en 1541. Pri la knabo zorgis lia patrina onklo, Agostino di Sbardellato, tiatempe episkopo de Vác.

Andreo studis en la german-lingva urbo Breslau/Wroclaw/Boroszló, kaj poste, per la financa subteno de kardinalo Miklós Oláh, ĉefepiskopo de Esztergom kaj primaso de Hungario, en la prestiĝa universitato "Bovo" de Padovo en norda Italio.

La talenta junulo baldaŭ iĝis sekretario de la angla kardinalo Reginald Pole, papa legato. Tiu kunprenis lin dum siaj misioj al Bruselo (rezidejurbo de imperiestro Karlo la 5-a), Londono kaj Parizo.

En Parizo Dudith kompletigis siajn universitatajn studojn, kaj amikiĝis kun francaj humanistoj, ekzemple kun la poeto Pierre (Petro) Ronsard. Li ankaŭ diligente tradukadis literaturaĵojn el la klasika greka lingvo al la latina, samkiel pli frue en Padovo. Tiujn presigis lia pli aĝa amiko Paŭlo Manucio, eldonisto en Venecio.

### Koncilia episkopo

Kiam li returnis sin al Hungario en la jaro 1560, la ĉefepiskopo de Esztergom ordinis Andreon Dudith pastro, kaj baldaŭ titola episkopo de Tina, poste de Pécs (tiam ambaŭ jam sub turka regado). Kiam en 1562 rekomenciĝis la ĝenerala koncilio de la romkatolika eklezio en Trento (norda Italio), Dudith estis elektita unu el la du delegitoj de la pastraro de Hungario.

Li estis tre aktiva. Bonega oratoro, li lerte subtenis la ĉefajn postulojn de la reformemaj protestantoj (koncerne la uzon de la kaliko ĉe la komunio, kaj la permeson al la pastroj edziĝi). Finfine la koleriĝinta papo mem per letero postulis de la imperiestro, ke li revoku Dudithon. Kaj tiel okazis.

### Diplomato de la imperiestro

Tamen la imperiestro aprezis la talentojn de Dudith. En 1563 tiu ekhavis sekretarian postenon en la Oficejo pri Hungario de la Imperia konsilantaro. Kiam li kondutis iom tro por-hungare, la imperiestro movis lin al la Oficejo de la polaj kaj litovaj

aferoj. La imperiestro Maksimiliano sendis lin kiel ambasadoron al Krakovo kaj Vilniuso. Last-loke Dudith konatiĝis kun bela korteganino, Regina Strasz, kaj en la jaro 1567 edziĝis al ŝi.

Tio estis ne nur societa skandalo, sed definitiva rompo kun la katolika eklezio.

Dudith aliĝis al la komunumo de la luteranoj. Poste li ĉiam pli simpatiis kun la plej radikalaj unitaranoj, kiuj neis la Sanktan Triunuon (la ekziston de tri personoj en la unusola Dio.) La papo, Pio V la Sankta, kiu cetere estis kunstudento de Dudith en Padovo, ekskomunikis lin kaj publike bruligis lian bildon.

Tamen la imperiestro akceptis lian Apologion (mem-defendon) kaj ne maldungis lin. Dudith ricevis la gravan kaj riskan taskon, elektigi la tre junan princon Erneston de Habsburg reĝo de Pollando. Sed li fiaskis. En 1576 István Bátori, princo de Transilvanio, estis elektita la nova reĝo de Pollando kaj grandduko de Litovio. Dudith devis senpokraste, dum januar-nokta neĝoŝtormo, fuĝi el Krakovo. (Cetere ankaŭ Bátori estis padova kunstudento – kaj konkuranto en la studoj kaj virin-aferoj – de Dudith.)

**Humanista sciencisto**

Post dua, same sensukcesa, samtema misio Dudith definitive retiriĝis el la diplomatio, ricevis pension de la nova imperiestro Rudolfo, kaj aĉetis baronan bienon en Silezio. Tie li vivis la vivon de multe korespondanta humanisto. Liaj filozofiaj bazkonceptoj estas bele esprimitaj en la sekvaj citaĵoj.

"*La universala kaŭzo estas la ĉielo mem, kiu pere de la moviĝo kaj la lumo estigas kaj vivigas ĉion kio ekzistas en la mondo, sed sen esti konscia pri la aĵoj mem.*"

"*Meze situas jena granda scenejo de Dio kaj de la naturo. Ankaŭ al vi estas donitaj la okuloj kaj la ceteraj sentorganoj, la elirpunkto de la filozofio en la servo de Dio. Ankaŭ vi ricevis la animon kaj la menson, kiel la ceteraj homoj. Agu do konforme al tio: subeniru en ĉi tiun ĵus menciitan mirindan kaj belegan scenejon, rigardi la naturon per viaj propraj okuloj, ne per tiuj de aliuloj; uzu viajn sensojn. Kion aliuloj asertas, aŭskultu, sed akceptu ĝin nur tiam, se ĝi konformas al la intelekto kaj al la naturo. La asertojn deviantajn de tio forĵetu, same libere kaj facile, kiel ili estas prezentitaj. Kaj kio ne estas sufiĉe esplorita, tion klopodu sindoneme kaj diligente klarigi.*"

Krom multe da aliaj temoj li okupiĝis ankaŭ pri la naturo kaj signifo de la kometoj kaj pri la maniero de propagiĝo de la pesto. Li havis pri ambaŭ novajn, pionirajn ideojn.

"*La kometo ne estas malbon-aŭgura ĉiela signo, kaj neniel efikas al la destino de reĝoj*".

Li konsideris ĝin natura fenomeno aperante trans la sfero de Luno.

"*Mi kredas trovi la senperan kaŭzon de la pesto pli en infekto fare de malsana korpo, ol en la aero.*"

Transloĝiĝinte kun sia (dua) edzino, Elizabeta Zborowska, al Breslaŭ, Dudith mortis tie, 56 jarojn aĝa, en 1589. Li ripozas en la luterana Sankta Elizabeta preĝejo en Wroclaw.




### Postvivo

Post iom pli ol 400 jaroj, la Pola Scienca Akademio kaj la Hungara Scienca Akademio kune entreprenis kolekti, redakti, komenti kaj eldoni la riĉegan korespondadon de Andreo Dudith. (Temas pri pli ol 1.500 leteroj en la latina, germana, itala kaj hungara lingvoj.) En Budapeŝto unu volumo el la planataj ses jam aperis en 1992. Tiu enhavas 204 leterojn.

## Niels Stensen (1638-1686)

Herezula sciencisto kiu iĝis episkopo

"*Bela estas kion ni perceptas, pli bela kion ni komprenas, plej bela kion ni nek percepti, nek kompreni povas.*"

### Studento kaj sekcisto

Niels Stensen ("Nikolao Stefanido") naskiĝis en Kopenhago, Danio, kiel filo de bonstata oraĵisto. Li studis en sia naskourbo, kaj ekde 1659 en protestantaj universitatoj de Nederlando. Lia preferata studobjekto estis la anatomio, pli speciale la glandoj, la muskoloj kaj la koro. Li malkovris la t.n. "*dukton de Steno*". Li sekcadis multe da animaloj kaj eĉ homajn kadavrojn. Niels Stensen, latinigite Nicolaus Steno, iĝis doktoro pri medicino de la universitato de Leyden en la jaro 1664.

### Anatomo

Li praktikis ne nur en Nederlando, sed poste du jarojn ankaŭ en Parizo kaj Montpellier. Li konatiĝis interalie kun Dekarto (Kartezio) k.a., akiris signifan famon en la intelekta vivo en Francio, kaj interŝanĝis leterojn kun Benedikto (Baruch) Spinoza.

### Sciencisto de la grandduko

Ferdinando de Medici la 2-a, grandduko de Florenco en Toskanio, invitis Stenon al sia kortego. Tie li ekinteresiĝis pri fosilioj kaj mineraloj, studis kaj priskribis tiujn. Lia baza ideo estis jena:

"*En la natursciencoj ni scias nenion alian, nur tion, kion prezentas la eksperimentoj kaj la observado, kaj kion ni povas el tiuj dedukti, laŭ metafizikaj kaj mekanikaj principoj.*"

Vojaĝadante multe en Mezeŭropo, li vizitis ankaŭ Hungarion. En la nord-hungaria distrikto de minejoj li kolektis rokaĵojn kaj ercojn de Selmecbánya/Schemnitz/Banská Šťiavnica (nuntempa Slovakio).

Fakte li metis la fundamentojn de la modernaj geologio kaj mineralogio. Kaj li konkludis:

"*Ekkoninte la miraklojn de la korpo kaj animo ni alvenas al la rekono kaj ekamo de Dio.*"

En Florenco, li aliĝis al la katolika eklezio. Pro tio, returninte sin al Kopenhago en 1672, li ne povis iĝi ordinara profesoro de la tiea, strikte protestanta universitato. Tamen estis permesata al li prelegi kaj fari publikajn sekcadojn de bestoj (ekzemple de urso).

**Misiista episkopo**

Do Steno reveturis  al Florenco en 1674, kaj en la sekvinta jaro li iĝis ordenita katolika pastro. Du jarojn poste li estis nomita titulara episkopo kaj "*apostola vikario de la nordaj landoj.*"

Steno agadis kiel misiisto en la jam tute protestanta norda regiono de Germanio, en la urboj Hannover, Münster, Hamburg kaj Schwerin. Iom



plifaciligis lian laboron la fakto, ke la tie parolata germana dialekto (platt-deutsch) similas al la dana lingvo.

Schwerin estis lia episkopa sidejo. Tie li mortis, fine de longa kaj suferiga malsano, apenaŭ 48 jarojn aĝa, en 1686.

Li ripozas en sia ŝatita Florenco, en la Baziliko de Sankta Lorenco.

**Postvivo**

La oficiala proceduro de beatigo de Nikolao Steno komenciĝis en 1938, okaze de la 300-a datreveno de lia naskiĝo. Tamen la unua grava paŝo okazis nur en 1989, kiam papo Johano Paŭlo la 2-a  deklaris lin venerabilis (honorebla)

Kiam sukcese finiĝis la kanonizo, Nikolao Steno estos la patrona sanktulo de geologoj, kiel Sankta Alberto la Granda (Albertus Magnus) estas tio de ĉiuj natursciencistoj.

# Lumo fine de la mondo

Franz-Georg Rössler, DE

La galega urbo Santiago de Compostela en okcidenta Hispanujo reakiris en la lastaj jardekoj sian mezepokan signifon kiel la tria plej grava pilgrimocelo de la kristanoj. La tombo de la apostolo Jakobo estis kaj estas la centro de la streboj de aŭtentaj pilgrimantoj tiam kaj hodiaŭ. Ankaŭ min kaj mian edzinon altiris en la "Sankta jaro" 2010 tiu ĉi gracoloko, kaj ni ricevis de la kapitulo de la katedralo, post la plenumiĝo de la reguloj kaj ceremonioj necesaj, la konfirman dokumenton, ke ni "pie kaj devote" estis vizitintaj la tombon de la sanktulo.

Poste ni ne tuj reiris al nia hejmloko, sed daŭrigis, kiel faris ankaŭ en la pasinteco kelkaj pilgrimantoj, ĝis la vilaĝo Finisterre, ĉirkaŭ 90 kilometrojn okcidenten. Tie la firma lando abrupte finiĝas, dronante en la senfina maro. Por la romianoj la Tero tie havis sian limon. Por ili vespere la Suno sinkis en senfinan oceanon kondukantan rekte al la kosmo. Konsekvence ili nomis la regionon *Finis terrae* [Fino de la Tero], nocio ankoraŭ speguliĝanta en la nomoj de la vilaĝo kaj de la kabo: Finisterre en la ŝtata hispana (kastilia) lingvo, Fisterra en la regiona galega.

Ankaŭ por ni tiu mistera loko, kie la tera vojo subite ĉesas kiel la vivovojo rande al la morto, estis magia celo. Ni jam konis ĝin kiel lokon de la konsciiĝo pri la propra fino, instigo al meditado kaj interna transformiĝo, subtenata de imponega pejzaĝo. Precipe altiris nin la kruda rokaĵo sinkanta en la foje plumbecan, foje ferocan maron. Tiu limo inter tero kaj akvo, inter lumo kaj malhelo, inter esto kaj malesto, inter vivo kaj morto estis la celo de niaj subkonsciaj aspiroj.

Iun tagon tie, travagante la marbordan pejzaĝon, ni atingis vilaĝorande la kastelon de San Carlos kun sia Muzeo de la peskado [Museo da Pesca]. Estiĝis rapide kontakto al ties direktoro Alexandre Nerium, kiu identigis sin poeto en la lingvo galega. Tuj evidentiĝis komunaĵoj kaj simpatio. Ĉar li en la muzeo kolektis literaturaĵojn pri Fisterra, li baldaŭ



Pluva lumo de Fisterra

invitis min krei poezian tekston pri Fisterra aŭ la loka regiono *Costa da Morte* [Marbordo de la morto]. Por la transdono li fiksis la venontan tagon kaj jam antaŭvidis intervjuon kun la regiona gazeto *Voz de Galicia*.

Senhezite, ankoraŭ vespere, mi verkis poemon en la germana kaj la kastilia lingvoj paralele. Ĝi limiĝis al kernaj vortoj en la kastilia, pri kiuj mi disponis ankaŭ meznoktatempe sen vortaro. Matene mia edzino tradukis la tekston en Esperanton, por enkonduki ankaŭ tiun ĉi "lingvon de la paco" en interkulturan renkontiĝon.

Venonttage akurate je la 17a horo jam atendis nin Alexandre Nerium kun raportista-fotista teamo. Dum la kunveno mi deklamis la kastilian version de mia poemo, rapide glatigitan de Alexandre. Mia edzino prezentis ĝin en Esperanto, kio multe impresis la ĉeestantojn. La renkontiĝo kun la reprezentantoj de la galega gazetaro temis pri internaciaj kontaktoj pere de la literaturo. Ĝi fakte rezultigis artikolon kun foto.




Survoje al Santiago kaj Fisterra

Rapide pasis niaj kelkaj tagoj fine de la Jakoba vojo. Ni enplantis la lumon de Fisterra en niajn mensojn: la blankan, grizan, nigran de pluvaj, ŝtormaj horoj kaj la oran de majestaj sunsubiroj trans la horizonton – lumon ĉefine de la mondo, lumon de la transa mondo.

**Vivovojo**

Naskiĝinte el la mallumo
Metite sur vojon
Por iri la straton
Sub la steloj
Kun homoj bonaj kaj malicaj
Pasante lokojn sanktajn
Kabanojn mizerajn
Ruinojn de epokoj
Florojn modestajn
Dezertojn kaj herbejojn
Montojn kaj valojn
Ĝis la fino de la Tero

Super la akvo senfina
Alte sur kruta rokaro
Transformite en anĝelon
Sin levi al la suno
Flugi
Al la lumo eterna



Alexandre Nerium (dekstre) kaj la aŭtoro

# Kelkaj ideoj de Søren Kierkegaard

Prelego dum la KELI-kongreso 2010
(bazita sur la sveda ”populigita” libro pri Sören Kierkegaard)

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

*”Ĉiu homo … posedas naturan bezonon havigi al si vivkoncepton, iun imagon pri la intenco kaj celo de la vivo.”*

Sören naskiĝis 1813 en sufiĉe granda kaj riĉa familio kun multaj gefratoj. Kaj la patrino kaj la fratinoj mortis junaj. Sören mortis 1855, tiam li estis malriĉa. Li metis la bazon por la sekva ekzistadismo, precipe por la kristana ekzistadismo.

Je la aĝo de 22 Sören pakis siajn valizojn kaj vojaĝis norden al malgranda vilaĝo en Danlando.

Je tiu aĝo Sören demandis sin mem pri la intenco kaj celo de la vivo. Pri tiu demando estis la komenco de vivlonga esplorado. Li studis teologion ĉe la universitato en Kopenhago kaj la patro esperis ke li iĝu pastro. Sed studi por Sören signifis multe da festado kun geamikoj en la kopenhaga ”jetset”. Li skribis en sian taglibron:

> *”ĉu gajnas al mi ke mi kapablas klarigi la signifon de kristanismo, povas klarigi multajn apartajn fenomenojn, kiam ili por mi kaj mia propra vivo havas neniun profundan signifon?”*

Kaj Sören vojaĝas norden por ”*fiksi sian rigardon sur sian propran internon*”, ĉar li ne trovis la vivcelon en la kopenhaga amuza vivo aŭ en la teologia studado. La 1-an de aŭgusto li skribas en sian taglibron la famajn vortojn:

> *”Temas pri trovi Veron, kiu estas vero por mi, trovi tiun koncepton por kio mi volas vivi kaj morti.”*

Tiam Sören ekkomprenas sian vivtaskon: esplori sin mem kaj aliajn homojn, esplori kiel ni funkcias, kiel ni homoj trovas nian vivcelon.

Nun li vere ekstudas kaj esploras ĉion dum 20 aktivaj jaroj: filozofion, biologion, kulturon, religion, medicinon. Ĉion – en kreiva malordo. Li verkis entute 7000 taglibrajn paĝojn kaj 40-ojn da libroj pri diversaj temoj, diversstile kaj sub diversaj kaŝnomoj.

En la universo de Kierkegaard la materia, la mensa kaj la spirita mondoj ne estas apartaj aŭ izolitaj mondoj sed ili apartenas ĉiuj al la sama tuteco, cirkloj kiuj ĉirkaŭas unu la alian.

1- La unua cirklo estas la materia, la sentuma parto de la universo / de la realeco.
2- La dua cirklo entenas la unuan cirklon kaj estas la mensa parto kaj

tie troviĝas la mensaj kapabloj, la analizkapablo, la volo, la emo, kreiveco, agadkapablo.
3- La tria cirklo ĉirkaŭas la aliajn, ĝia limo estas neimagebla ĉu eĉ ekzistas, kaj estas la eterna / la spirita flanko de la Tuteco

Laŭ Sören ne sufiĉas ordigi sian vivon rilate al la fizika mondo. Ne gravas kiel ajn ni ordigas ĝin, trankvila aŭ aventura aŭ ekonomie sekura. Iun tagon ni demandas nin: Kial? Kial mi vivas? Kio estas la intenco? Tio estas neevitebla natura evoluo.

Tiuj demandoj igas Sören studi sin mem, siajn amikojn en Kopenhago sed ankaŭ aliajn enloĝantojn kiujn li renkontas surstrate kaj alparolas. Post longa tempo kaj multaj notoj en siaj taglibroj li ekkomprenas kiel ĉio funkcias. Kion la homo devas fari por ke ŝi/li progresu en sia propra evoluo kiel homo.

Li trovas tri stadiojn kaj iom simpligite ili nomiĝas:
1- rilato al la fizika mondo aŭ karno – laŭ lia propra nomigo ”estetiko”
2- rilato al si mem aŭ emocieco – laŭ lia vorto ”etiko”
3- rilato al la spirito, al la Ĉio – laŭ li ”spritualeco”


Kierkegaard, 1840

Ankaŭ en ĉiuj tri stadioj li trovas tri paŝojn kiuj progresas antaŭen. Kierkegaard ne opinias ke unu stadio estas pli bona ol la aliaj, sed samtempe li opinias ke oni devas eltrovi ilin en ĝusta sekvo. Unue vi devas majstri la unuan por ke vi povu daŭrigi al la dua kaj simile vi devas majstri la duan stadion antaŭ ol vi kapablas esplori la trian stadion. Ĉiu sekvanta stadio laŭ Kierkegaard profundigas la antaŭan. Se vi bone rilatas al vi mem vi ankaŭ rilatas pli bone al la fizika mondo, kaj se vi bone rilatas en la spirita mondo vi eĉ pli profunde rilatas kaj al vi mem kaj al via ĉirkaŭa mondo.

Sed laŭ li ankaŭ ekzistas baroj kontraŭ bona evoluo. Kaj tiuj estas:
- infanedukado – kaj li pensas pri strikta kaj limiga edukado,
- adaptiĝo – nia ĉiama deziro aparteni al iu societo, al la grupo
- sociaj konvencioj

Laŭ Sören ĉiuj tri malakrigas niajn internajn delikatajn serĉilojn – nome niajn malfermecon kaj scivolemon.

Ni ĉiuj havas la rajton kaj kapablon trovi nin mem laŭ Sören, evolui al plena kaj kompleta kaj unika homo. Sed li ne volas esti ies instruisto, li ne volas disĉiplojn. Li montras unu manieron, unu vojon, ne la ununuran Vojon.

Ni trarigardu lian manieron – la 9 paŝojn kiuj gvidas al tiu pleneco.

## 1. Rilato al la fizika mondo

### 1.1. Renkonti la mondon – observado

La juna infano observas la mondon, observas ĝin kaj akceptas ĝin kiel ĝi estas: lampo, lakto, papilio ktp. Ni kiel homaj serĉantoj devas komenci nian serĉadon tie, kie ni estas, kion ni nun bezonas, en tiu ĉi momento. Eĉ se temas pri la plej profunda signifo de nia vivo. Simple: Kion homo bezonas – tion homo bezonas, kion homo ĝuas – tion homo ĝuas, Kie ŝi/li estas – tie ŝi/li estas.

La materia mondo estas nia bazo. Ni estas kreitaj de materio – sen materio estas neniu homo, neniu cerbo, neniu sento, neniu ekzistado. La materio estas parto de ĉiu ero de nia korpo, ĉiu ĉelo – kaj ni ĝojiĝu pri ĝi. Kiam ni per nia mano sentas la tekstilaĵojn en la mebla vendejo aŭ kiam ni promenas en bela ĝardeno kaj kolektas la florajn odorojn kaj belecojn, tiam ni rilatas al la fizika mondo kaj espereble ĝuas ĝin.

Kierkegaard en tiu ĉi paŝo serĉas la kontakton kun la mondo, la tuja renkontiĝo, la scivolemo kaj la ĝuo. Trovi ĝojon en tio, kio estas ekster ni, estas unu el la donacoj de la vivo. Kaj samtempe ni vivas nek pasintece, nek estontece. Ni vivas nun, en la tuja, senpera vivo.

### 1.2. La kolektado

*”La plejmultaj homoj tiel blinde ĉasas la ĝuon ke ili preterpasas ĝin”*

Kiam la homo forlasas la observadon kaj diras ”*estas mia*”, ŝi/li jam estas survoje al la sekvanta paŝo – la kolektado. La fizika mondo nun ne nur estas objekto por observado sed ankaŭ por uzado, por la travivado kaj ankaŭ por sia propra valoro – la posedo. Posedo donas potencon kaj altiras atenton. Per la aĵoj kiuj ĉirkaŭas nin, ni fortigas nian personecon. La aĵoj ligiĝas kun la persono kiu kreskas kaj okupas pli da vivospaco kaj la vivo riĉiĝas almenaŭ pormomente.

Kierkegaard ne estas escepto. Li kolektas librojn kaj kaftasojn. Li vere ĝuas sian vivon.

Ne nur aĵojn ni kolektas. Ni ankaŭ kolektas vojaĝojn, spertojn, sciopovojn – ĉion, kio estas ekster ni kaj per kio ni volas riĉigi nin, ĉion, kio eble igus nin pli memfidaj, pli gravaj, pli bonaj homoj. Simple dirite ”*pli multe*”. Kaj la historio kaj la moderna tempo donas multajn ekzemplojn de personoj kiuj ne havas sufiĉe da aŭ potenco aŭ mono aŭ io simila.

La deziro havigi al si aĵojn ne estas la problemo laŭ Sören. La baza problemo estas ke ”*ne sufiĉas*”. La unua libro kiun vi aĉetas estas bonega, la dua kaj la tria ankaŭ, sed kiam vi havas 100 aŭ eĉ mil kaj vi tamen deziras pli da libroj, ili ne donas la saman kontentigon. Kaj ĉiam vi trovas iun kiu havas pli da libroj, aŭ vidis pli da filmoj aŭ vizitis pli da landoj aŭ havas pli altan postenon aŭ… .

La teorio de Sören kial la konsumado ne sufiĉas por doni vivcelon estas ke la ”*plezuro ne troviĝas en la ĝuo mem sed en la imago pri la estonta*

*ĝuo*". Nuntempaj neŭroesploristoj pravigas tion ke la sopiro pri tio kion ni volas travivi, donas pli da plezuro ol la vera travivaĵo.

La serĉado pri ĝuo kaj plezuro estas baza en nia biologia sistemo, do nenio malbona, la biologia sopirsistemo igas nin labori, serĉi nutraĵojn, serĉi vivo-partneron ktp. Ĝi estas baza sistemo por ke la homaro travivu generacion post generacio.

Laŭ Sören ni rajtas kolekti aĵojn, ĝui la fizikan mondon, sed ni ne trompu nin mem kaj kredu ke tio sufiĉas.

### 1.3. Ebriiĝi per la aĵoj

*"La malfeliĉulo estas tiu kiu pli malpli havas sian idealon, sian vivenhavon, sian konscion, sian esencon ekster si mem. La malfeliĉulo ĉiam estas for de si mem, neniam ĉeestas".*

Por kelkaj el ni homoj la rilato al la fizika mondo trapasas de plezuro kaj kolektado al ia formo de ebriiĝo. La rilato al la aĵoj ekzaltigas nin, obsedas kaj avidegas nin kaj ĉio alia malaperas. La pasio iĝas manio kaj ni riskas ke ĝi trompas nin ke la rilato al la fizika mondo estas la vero, la vivcelo. Estas multaj manieroj perdiĝi. Ne nur temas pri aĵoj kaj mono sed ankaŭ pri labor-egemo/"labordrogeco", la kurado de unu projekto al alia, de unu sperto al iu alia pli riĉa.

Se mia manio aŭ pasiego estas laŭmoda, estas facile kaŝi mian ebriiĝon. Se temas pri boncela laboro ekz. se mi gimnaztikas kelkfoje semajne aŭ karieras kaj ekonomie riĉiĝas mi kontraŭe kredas, ke mi estas en bona direkto, ke mi bone evoluas. Ĉar tio estas laŭ nia nuntempa modo. Mi verŝajne ankaŭ ricevas laŭdon de ĉirkaŭantoj kaj eble ili eĉ envias mian vivon kaj sukceson.

Laŭ Sören nenio estas malbona kaj vi ne eraras se la deziro venas de via interno kaj vi vivas en harmonio kun viaj veraj bezonoj. Sed se viaj agoj estas gvidataj de eksteraj valorjuĝoj kaj postuloj de aliuloj, tiam vi eraras. Tiam la rilato al la fizika mondo ne plu estas observado kaj esplorado. Tiam ĝi kondukas vin kaj ordonas vin. Vi estas ĝia kaptito.

La homa serĉado havas multajn formojn sed baze estas serĉado por trovi sin mem. Tiel kredas Kierke-gaard. La serĉado komenciĝas en la fizika mondo sed ne povas halti tie. Vi laciĝas je la fizika mondo kaj vi volas serĉi ion alian.

Tiu kiu kapablas bone aŭskulti sin mem kaj sian evoluon jam frue spertas kiam estas tempo progresi en pro-fundecon kaj memkonon.

Kontraŭe, se vi ne povas aŭskulti vian internon, vi surde daŭrigas same kiel antaŭe kaj laŭ Sören vi ŝtoniĝas kaj iom post iom trovas la vivon sencela kaj malplena. Tion Sören nomas ***Malespero***.

[daŭrigota en sekvonta numero]

# Al Mianmaro oni katenas la buŝon

Jacques TUINDER, NL

Jam dum dekoj da jaroj Mianmaron skurĝas serioza malrespektado al homaj rajtoj. La lastaj elektoj okazis en 1990. La partio de Aung San Suu Kyi tiam nerefuteble gajnis, sed la militista reĝimo rifuzis cedi siajn pozicion kaj potencon. En la dudek sinsekvaj jaroj Mianmaro evoluis al unu el la plej subpremaj ŝtatoj de la mondo. La preskaŭ seninterrompa deviga hejmrestado de Aung San Kuu Kyi, la pli ol dumil politikaj malliberuloj kaj la sangoverŝa forbatado de demonstracioj favore al demokratio de 2007 parolas klaran lingvaĵon. Nun la ŝtatestro, generalo Than Shwe kun sia reĝimo, anoncis novajn elektojn por 2010. Li promesis 'liberajn kaj honestajn' elektojn, sed jam en la preparperiodo tiom evidente flankenŝoviĝas la homaj rajtoj, ke apenaŭ iu lin kredas. Tial *Amnestio Internacia* komencis kampanjon, petante al la membroj 'doni sian voĉon'. La kampanjo turniĝas ĉirkaŭ malrespektado al esprimlibereco kaj libereco de unuiĝado kaj kunvenado.

La lastaj elektoj en Mianmaro estis farĉo. La Nacia Ligo por Demokratio (NLD), kiun ĉefas Aung San Suu Kyi, rikoltis 80 procentojn de la parlamentaj seĝoj. La reganta reĝimo tamen restis. Oni arestis Aung San Suu Kyi por restigi ŝin dum multe da jaroj sub gardistaj okuloj. Ankaŭ multe da aliaj prominentaj partianoj oni 'sendanĝerigis'.

Por la unua fojo en dudek jaroj nun alproksimiĝas elektoj, kvankam daton oni ankoraŭ ne fiksis. La registaro anticipe faris ĉiajn aranĝojn por antaŭinflui la rezultojn. Tiel la Konstitucio de 2008 kaj novaj elektoleĝoj zorgas pri tio, ke partoj de la loĝantaro ne havas la rajton doni sian voĉon, kaj ke ankoraŭ pli da homoj ne povos kandidatigi sin.. Malliberuloj, ekzemple, ne rajtas doni sian voĉon, dum la prizonoj en tiu lando estas plenplenaj de homoj kiuj nur en pacama maniero esprimis sian opinion. Same homoj kiujn oni juĝis 'mense aŭ finance malsanaj'. Same homoj elpelitaj surbaze de la elektoleĝoj. Tiuj lastaj



difinoj estas tiom nebulaj, ke la registaro povas kompreneble ilin apliki libere kaj arbitre.

Kiu deziras kandidatigi sin devas respondi al multe da severaj reguloj. Homojn en la pasinteco kondamnitajn pro malobeo al la elektoleĝoj kaj tiujn kiuj membras en malpermesitaj organizoj oni ekzemple ekskludas.

*Amnestio Internacia* havas seriozajn zorgojn pro la esprimlibereco survoje al la elektoj. Mianmaro havas tradicion de grava malobservado al homaj rajtoj. Multe da homoj kritikantaj la registaron estas enkarcerigitaj aŭ eĉ murditaj. La lando nun nombras pli ol dumil politikajn malliberulojn.

Ekde junio 2010 *Amnestio Internacia* do kampanjas kun speciala atento al etnaj malplimultoj (40%). La organizo agadas ankaŭ por malliberigo de politikaj kaj prokonsciencaj prizonuloj kaj intencas helpi al ĉiuj kiuj kuraĝas defendi homajn rajtojn en Mianmaro. Se en via lando ekzitas sekcio de A.I., aliĝu kaj plene subtenu la kampanjon materie kaj morale!

---

**KARA REDAKTORO,** mi tre kore salutas vin kaj la viajn novjare. El la pasinta jaro mi havas ankoraŭ du fotojn pri la ŝanĝo de la kasisteco en la germana KELI-sekcio. La renkontiĝo estis 23.10. en Nurenbergo.

Astrid Hanke demisiis kiel kasistino post admirinde longa servo. Posteulino estas Hedwig Fischer, edzino de la GEA-prezidanto d-ro Rudolf Fischer.

Siegfried Krüger, Rudolf Fischer, Hedwig Fischer kaj W. Rohloff



# Ŝercoj kolektitaj (5)

MU Binghua, Ĉinio

- **En aŭtobuso sidis** dormanta viro apud tre eleganta sinjorino. Post kelkaj minutoj la sinjorino elaŭtobusiĝis. La aŭtobuso veturis nur kelkajn metrojn. La ĵus eliranta virino grandvoĉe kriis: “Haltu, haltu!” La ŝoforo demandis: “Kio okazis?” Ŝi diris: “Mi perdis unu objekton, kiu restas en la buso.” Ŝi ree enaŭtobusiĝis kaj vekis la profunde dormantan viron. Origine, la viro estas ŝia edzo.

- **Suboficiro pridemandis** junan soldaton: “Kial vi forkuris, kiam vi ekvidis malamikon?” La soldato respondis: “Mi tamen ne timis lin. Mi ja scias, ke la terglobo estas ronda. Mi intencis ĉirkaŭiri malantaŭ lin por pafi lin.”

- **Apud strato** homo kun sunokulvitroj ion almozpetis de preterirantoj. Li diris: “Bonkora sinjorino, bonvolu almozdoni kelkajn monerojn. Jen mi estas blindulo kompatinda!” “Viaj okuloj ne povas vidi, kiel do vi juĝis ke mi estas virino?” “Oh, pardonon. Mi almozpetas nur anstataŭ mia blinda amiko.” “Nun, kie li estas?” demandis la scivolema sinjorino. “En kinejo li spektas filmon.”

- **Knabino el kamparo** staris sur supervojo kaj nombras domegajn etaĝojn. Alvenas trompisto kaj laŭte mallaŭdas: “Ĝis kioma etaĝo vi kalkulis? Donu al mi punmonon, 5 juanojn por unu etaĝo!” La knabino murmuras: “Nur 15 etaĝojn,” kaj vole-nevole donis monon. Unu rigardanto miras, dirante: “Li estas trompisto. Kial vi estas tiel malsaĝa?” Sed la knabino refutas. “Nur li estas malsaĝa. Mi lin trompis. Efektive mi kalkulis jam ĝis 18 etaĝoj!”

- **Aĉetanto babilis** kun vendisto de fruktoj. “Kiom da fruktoj vi vendis hodiaŭ?” “120 kilogramojn.” “Kiom do hodiaŭ vi aĉetis pogrande?” “100 kilogramojn.” “Kial estas la superfluaj 20 kilogramoj?” “Tio ĝuste estas kaŭzo, ke mi gajnis profiton.”

- **Viro A: “Hieraŭ nokte,** kiam mi estis en drinkejo, ŝtelisto kaŝe eniris mian hejmon.” Viro B: “Kion li forŝtelis?” Viro A: “Nenion. Sed en la mallumo mia edzino prenis lin por mi, kiu pro drinkado revenis malfrue kaj per dika bastono batis lin ĝis tiu laŭte kriis ‘helpon!’. Feliĉe alvenis policano kaj savis lin.

- **Ĉar abrupte pluvegis,** homoj sur stratoj diskuris haste. Sed iu sinjoro iris tre malrapide. Mirante oni demandis lin: “Kial vi ne iras rapide?” La homo aplombe respondis: “Estas ja vane. Jen ankaŭ antaŭe pluvas.”

- **Estis regiono,** kie ege riĉis, tiel ke tieaj riĉuloj ne havis ŝancon doni monhelpon. Do ili vokis unu almozulon el aliloko. Post iom longa tempo la almozulo havigis al si malbonan temperamenton. Kelkfoje li minacis loĝantojn: “Morgaŭ mi reiros mian hejmlokon. Mi lasos vin almozdoni al neniu!”

- **Amiko promenis** sur aleo en parko. Subite aperis antaŭ li homo, kiu diris al li “Sinjoro, bonvolu kompati min, donu al mi monbileton. Mi nun ne havas okupon, hejme ankoraŭ restas edzino kaj infano. Mi havas jam nenion alian ... krom ... tiu ĉi pistolo.”

- **De malproksime** venis intelektulo kaj demandis al vilaĝanoj. “Kiu en via vilaĝo estas la plej erudicia?” “Maljuna Wang,” ĉiuj voĉoj opiniis. La intelektulo trovis lin kaj fiere diris: “Sinjoro, ĉu vi kapablas per sama solvo respondi kvardek diversajn demandojn?” “Bonvolu eldiri.” La intelektulo per unu spiro metis ĉiujn demandojn. Apenaŭ finis la demandanto, maljuna Wang, senprokraste, jam respondis. ”Mi tute ne scias.” Tiam tiu intelektulo povis diri nenion. ☙

---

# La forto de malbona kutimo

– rakonto por morala instruo

tradukis Larisa Kuzmenko, RU

Unu maljuna piulo evitante laikajn vantaĵojn elektis en dezerto, tamen la gloro pri liaj sanktaj heroaĵoj disvastiĝis eĉ en malproksimaj landoj. Unufoje du junuloj venis al li por konsulti kaj demandis: ”Patro, kiel elradikigi malbonajn emojn kaj kutimojn?” La maljunulo respondis: ”Iru kaj elŝiru la malgrandan arbon.” La junuloj facile plenumis la ordonon. La maljunulo denove petis: ”Iru kaj elŝiru kun la radikoj ĉi tiun grandan arbon.” La junuloj estis embarasitaj: ”Ĉi tion ni ne povos fari: la arbo estas tro granda kaj ĝiaj radikoj estas profunde en la grundo!” Post tio la pia dezertulo respondis: ”Similas tiu ĉi arbo al la malicaj emoj. Se ili ne profunde enradikiĝis en vian koron vi povos ilin facile elradiki kaj neniigi, tial ĝustatempe batalu kontraŭ malbonaj kutimoj. ☙

# mi memoras

## Mia unua KELI-kongreso

### 19–26/7 1969 en Kiljava

Vendredon, la 11-an de julio 1969 komenciĝis mia unua esperanto-vojaĝo. Jelly Koopmans iniciatis tiun entreprenon. Post kiam mi studis esperanton dum unu jaro sekvis nun la praktika ekzameno. Ĉu mi sukcesus kompreni la eksterlandajn esperantistojn kaj eĉ paroli kun ili? KELI-membroj en Västerås kaj Stockholm, Svedio, gastigis la du nederlandaninojn survoje al Finnlando.

Post agrabla kaj lerniga semajno ni atingis la kongresejon en soleca, arbara regiono apud lago.

Tie finiĝis la reloj kaj la transportilo simple haltis en “la mezo de nenio”.

Nur malmulte mi rememoras pri la prelegoj sed trafoliumante la foto-albumon mi estis trafita de la grava rolo de muziko. La bildoj de la ekskursoj montras novajn spertojn. Ankaŭ neniam mi forgesos la eksterdoman, lignan saŭnon kaj la postan plonĝon en la malvarman akvon de la lago.

Multaj el la tiamaj kongresanoj forpasis sed el la junulargrupo restas kelkaj ĝis la hodiaŭa tago aktivaj kongresvizitantoj: Pavel, Sieglinde, Ruth, Mats kaj Anna.

Post tiu semajno atendis la lasta defio, partopreno de la Universala Kongreso en Helsinki kun multaj ĉeestantoj en ĉiuj kunvenoj.

La 6-an de aŭgusto je la 23-a horo finiĝis mia vojaĝo tra Esperantio sur la stacidomo de Leiden.

Els van Dijk



Sur la foto vi vidas de maldekstre al dekstre: Els van Dijk (Kuperus), Ruth van Puijenbroek (Walder) starante, kaj Sieglinde Stamm

# Mesaĝo por Internacia Virina Tago 2011, Hirosima

Karaj virinoj en la mondo, en la nomo de kunveno en Hirosima por la Internacia Virina Tago 2011 ni sendas al vi elkoran saluton de amikeco. Ni, plenuma komitato de la Virina Tago konsistas el 20 organizoj kiuj ĉiutage aktivas en diversaj medioj por egalrajtoj inter viroj kaj virinoj, altigo de virina posteno en la socio, konstruo de socio de komuna partopreno de geviroj, kaj paco.

Ni havos kunvenon por la Internacia Virina Tago la 8-an, marto, 2011 kun la temo "Paco kaj Virinaj vivoj". Ni aŭskultos prelegon, kantojn, kaj spektos filmon, interŝanĝos pri niaj agadoj porpacaj. Krome ni ekspozicios mesaĝojn porpacajn kaj fotojn de virinaj vivoj ĉe publika ekspoziciejo kaj kunvenejo de la Virina Tago.

Historio de la Virina Tago originis en 1907 okaze de manifestacio de virinoj en Novjorko, Usono, postuli panon kaj egalrajton. Virinoj dezirante pli bonan vivon kaj postenon disvastigis agadon por Paco, Egaleco, Disvolviĝo kaj Evoluo. En paco realiĝos pli bonaj postenoj de virinoj. La historio de Internacia Virina Tago samas al historio de virinoj de Hirosima kiuj agadas neniigi nuklearmilojn.

La urboestro de Hirosima en 2010 apelis "Perspektivon 2020" cele al neniigo de nuklearmiloj ĝis 2020, kaj ni el Hirosima luktas por ĝi levi ondojn de internaciaj voĉoj realigi nuligon de nuklearmiloj sur la tero. Ni petas vin doni al ni vian mesaĝon porpacan, kaj informon pri eventoj aŭ agadoj porpacaj en via lando, regiono, municipo aŭ de vi mem. Ni ekspozicios vian mesaĝon ĉe publika ekspoziciejo kaj en la kunveno de la Virina Tago.

S-ino NOBUMASA Ĉieko,
Prez. de la plenuma komitato
Plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2011, Hirosima
Municipo Hirosima

| | |
|---|---|
| Limdato kaj aliaj: | Ĝis la 20a, feb. 2011. Maksimume sur unu leterpapero A-4 formata. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni. |
| Kun notoj petataj: | Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko(urbonomo), lando. |
| Kontaktoadreso: | OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp<br>Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima,<br>734-0041 Japanio |

# informetoj

## Aŭskultu kaj laŭtlegu la Biblion

Mi (iom post iom) laŭtlegas la Biblion en Esperanto tie ĉi:

http://audioboo.fm/keneto

Mi ĵus finlegis la epistolon al la Galatoj – ne estas la plej longa libro el la Biblio, sed ankaŭ ne la plej mallonga! Do, jen komenco.




Se iu volas kunhelpi, bonvolu sekvi la sistemon tie uzatan, necesas nur komputilo kun mikrofono – aŭ eĉ nur poŝtelefono kun la programo Audioboo. Dankegon!

Kenn CAVINESS, USA

## 61-a KELI kongreso – 2:a listo de aliĝintoj

25. Polnický Pavel, CZ
26. Krűger Siegfried, DE
27. Ahlrén Áke, SE
28. Vencl Jiří, CZ
29. Borsboom Ed, NL
30. Dijk van Els, NL
31. Boschin Serio, IT
32. Klimeš Pavel, CZ
33. Schaeffer Hedwig, DE
34. Schaeffer Karl Heinz, DE
35. Pokorná Jana, CZ
36. Marešová Věra, CZ
37. Kaszab Párkányi Erzsébet, HU
38. Párkányi Levente, HU
39. Sisa Ágnes, HU
40. Pospíšil Václav, CZ
41. Pospíšilová Ria, CZ
42. Ojasild Endel, EE
43. Cayzac Hanna, FR

# Al ĉielo petoj kaj preĝoj,
# el ĉielo beno kaj pano...

**Ekzistas pano de mateno**
kiel la anĝelo ĝin portis
laŭ-rakonte al la profeto,
por ke li pilgrimu pluen
vojaĝon de unu tago.
Benu, ho Sinjoro,
la matenan panon
kaj ĉiujn kiuj sian hejmon
forlasas pro la ĉiutaga tasko.

**Ekzistas pano de vespero**
kiel la vidvino de Sarepta
bakis la lastan paneton
kaj poste eble mortos,
kiel multe da patrinoj
en landoj malsatantaj.
Benu, ho Sinjoro,
la vesperan panon
kaj serĉu, trovu inter ni
manojn metantajn panon
en viajn manojn por disdoni,
por ke Via riĉa beno
ĝin multobligu same kiel
tiun vesperon apud la maro.

**Ekzistas pano ĉiutaga,**
horoj kvazaŭ pano tranĉitaj,
plena vivo inter ni dividota.
Al Vi ni petas kaj preĝas:
Donu al ni la panon ĉiutagan
kaj gardu nin por la tago
en kiu ni ne plu kapablas
alte estimi viajn donacojn.

**Ho Dio, donu ĝin al ni hodiaŭ**
ĉar vere vivi ni neniel povas
kun restaĵoj kaj rompopecoj
de la tago jam hieraŭa.
Donu ĝin ĉiutage nov-bakita
ĉar ne ekzistas certa garantio
por amo kaj por estonteco.
Ĉiu tago bezonas Vian benon,
do plenfide ni ĝin petas al Vi.
Jesuo, via filo, nia tablo-kunulo
– pano por ni ĉiuj disrompita –
rakontis, predikis, heroldis,
ke Vi estas plej bona Patro
nepre ne dononta ŝtonon
al siaj infanoj panon petantaj.

Laŭ teksto de Eŭgeno Laridon
prilaboris: Jacques Tuinder

Sen ĉen′, sen pen′
danke al Krist′ Jesuo

Sen am′, sen pan′
dum jaroj solis mi
antaŭ ol vidi lin
antaŭ ol fidi lin
antaŭ ol renaskiĝi
antaŭ ol de li elaĉetita
ĉar li estas mia ĝojo
feliĉon li kaŭzas al mi
pacon li donas al mi

Tial, mi nur lin adoras
mi des pli servadas lin
en liajn manojn mi metas la vivon

## PREĜO

Se ni havas koron puran kaj
se ni pardonemas al niaj ŝuldantoj kaj
se ni havas indan preĝ-motivon kaj
se ni havas fidon kaj
se nia peto kongruas kun la Di-volo kaj
se ni preĝas je la nomo de Jesuo Kristo kaj
se ni petas la peradon de l′ Spirito Sankta.
Tiam…
Nia preĝo efikos
ĉar Dio aŭskultos nin
Li ja respondos al ni.

El Madagaskaro salutas:

FIDILALAO Henriel
Ambohidrapeto